



TEA-BULTENO

18^A JARO - N° 124

MARTO - APRILO

N. 3-4/2015

Legi estas kiel traduki, ĉar la spertoj de du diversaj homoj neniam similos. Malbona leganto estas kiel malbona tradukanto. Por lerni legi korekte, klereco estas malpli grava ol instinkto.
Wystan Hugh Auden, angla poeto (1907-1973)

Jara Asembleo de TEA dimanĉon la 1^{an} de februaro 2015

Raporto de la prezidanto

Estimataj Asocioj, karaj Geamikoj,

Antaŭ ol paroli pri agado pasinta, pri nia TEA, mi invitas vin ĉiujn rememori nian Viglon, Giuseppe Valente, kiu forlasis tiun ĉi surteran mondon pli-malpli antaŭ tri monatoj. Viglo estis elstara membro plena je ideoj, modernaj elpenaĵoj, aktiva ĝislaste, kaj postlasis valoran modelon pri agado kaj kunlaborado, instruigan kaj imitindan. Post malmultaj tagoj de tiu okazintaĵo, frapis nin la anonco pri la forpaso de d-ino Ariella Colombin, iama nia membro tre aktiva, kiu multe laboris por Esperanto kaj al kiu ni ŝuldas la organizadon plurjaran de internacia poezia konkurso. Por honoro tiujn ĉi niajn karajn personojn, mi petas unu minuton da silento.

Kaj nun, ni revenu al la nuna jarkunveno. Nia akurata sekretariino detale priskribos la agadon plenumitan en la pasinta 2014^a jaro kaj mi ne volas forpreni de ŝi la plezuron rakonti pri tio.

La pasinta jaro karakteriziĝis per nia partopreno en kvar Grundtvig-Seminarioj de la projekto "Elloke tutmonden, la novaj defioj por volontulado", financita de Eŭropa Unio per € 20.000, kaj en kiu ni estas partneroj de aliaj kvin grupoj:

★Bjalistoka Esperanto-Societo el Bjalistoko - POLLANDO

★Esperanto-Grupo "Mario Sola" el Vercelli - ITALIO

★EUROKKA-Esperanto-Rok-Asocio el Tuluzo - FRANCIO

★Esperanto-Klubo "Espero" el Visaginas - LITOVIO

★Skota Esperanto-Asocio el Edinburgo - SKOTLANDO

En la kvar Seminarioj de 2014, nia Asocio partoprenis per 13 personoj: la deviga minimuma nombro estis 12. Verdire mi esperis en partopreno de du pliaj personoj, tamen tio ne eblis.

La lasta Seminario okazos ĉijare en Vercelli de la 28^a ĝis la 31^a de marto. Se iu ŝatus partopreni, tiu bonvolu kontakti min. Kompreneble ne ĉio finiĝos per tiu ĉi renkontiĝo. Tuj poste ni devos prepari ĉiujn dokumentojn kaj formalaĵojn por ricevi la aprobon de la itala instanco taskita por tiuj projektoj kaj, sekve, la lastan parton de tiu sumo. Estis tre interesa sperto, kiun mi ŝatus ripeti, kvankam sub aliaj kondiĉoj. Ankaŭ el la nefacila eltrovo de partoprenintoj en tiuj Seminarioj - partopreno kiu estis preskaŭ senpaga - oni konstatastas ke nia Asocio bezonas novajn fortojn.

Nia grupo, malgraŭ la fideleco kaj sindediĉo de la membroj, velkas. Ni ĉiuj fariĝas, bonŝance, malpli junaj sed kun pli kaj pli da problemoj diversspecaj.

Kaj kvankam ni estas en kontakto kun kelkaj lokaj asocioj kaj aktivas, kultur-

medie, en diverstemaj kunvenoj kaj situacioj, akiri lernantojn kaj novajn membrojn ege malfacilas. Kion fari? Ĉu nia labormetodo estas malbona, netaŭga por la nuna tempo? Ĉu ni erare agas? Kion pli, aŭ tute alie, ni povus fari por iomete - mi substrekas la vorton iomete - sukcesi? Vi eble povus respondi al tiuj ĉi demandoj, tamen, post la respondo, oni estu preta kunlabori por realigi novan strategion. Kaj kiel mi jam diris pasintjare, sen novaj fortoj, sen pli junaj kunlaborantoj, kiuj certe kapablus utiligi aliajn varbmetodojn, pli modernajn, pli oportunajn por junularo, nia Asocio devos alfronti malfacilajn momentojn. La tempo ne laboras favore kaj TEA ne havas antaŭ si helroz-koloran estontecon.

La kostoj por vivteni TEA-n estas ĉiam pli altaj, niaj rimedoj ĉiam pli malaltaj. Ni ankoraŭ povas elteni, tamen ĝis kiam? Niaj historia heredaĵo, memoro, biblioteko, arkivo, bezonas spacon kaj zorgadon kaj estus tre oportune esplori pri eblaj solvoj. Se iu havas proponon, tiu bonvolu sinanonci kaj konkrete paroli. Tio ne urĝas, tamen en proksima estonteco ni devos okupiĝi pri tio kaj, sekve, pristudi la situacion jam nun, estus avantaĝo.

Mi finas tiun ĉi raporton per la jam tradicia invito subteni konstante nian Asocion precipe

Agadraporto de la sekretario

Tre estimataj kaj karaj TEA-anoj!

La malnova jaro jam de unu monato estas for kaj nun venas la momento aŭskulti, kiu agado estis farita de Triesta E-Asocio dum 2014.

Tutunue mi deziras rememori al vi pri la konata **Projekto Grundtvig**: ELLOKE TUTMONDEN: LA DEFIJOJ DE VOLONTULADO, kies unua seminario okazis ĝuste en Triesto, de la 25^a ĝis la 27^a de oktobro 2013. La ĉefa celo de la projekto, en kiu partoprenas esperantistaj asocioj el Francio, Litovio, Pollando, Skotlando, kaj el Trieste kaj Vercelli por Italio, estas klopodi igi pli kapablaj kaj profesiaj la asociojn, kaj transdoni stimolon al pli efika aktivado precipe sur loka kampo. La ideo de tiu ĉi projekto estiĝis el la fakto, ke tro ofte volontuloj metas je dispono multajn energiojn kaj bonan volon, sed mankas al ili profesieco, kaj tial tiu neelprovita kaj nesinergia agado ofte ne donas la deziratajn rezultojn. Por akiri tiajn kapablojn, ĉiu el la 6 partneroj, ekde septembro 2013 ĝis la fino de junio 2015, sukcese strebis, kaj ankoraŭ strebos, aranĝi taŭgajn instruseminariojn, por plilertigi la homojn. Dum la jaro 2014^a anoj de TEA ĉeestis la jenajn seminariojn: en Tuluzo, Francio, 20^a-24^a de februaro; en Pitlochry, Skotlando, 6^a-8^a de junio; en Visaginas, Litovio, 27^a-29^a de aŭgusto; en Bjaliŝtoko, Pollando, 10^a-12^a de decembro. La lasta seminario okazos en Vercelli, fine de marto, kaj la tuta projekto finiĝos la 31^{an} de junio 2015.

En **januaro** estis finpresita de la eldonejo "Luglio Fotocomposizioni" la turisma libreto "Triesto, inter Karsto kaj Maro - Magiaj itineroj". Temas pri belaspekta gvidilo el 108 paĝoj, riĉa je koloraj fotoj, kiu prezentas la urbon Triesto, ĝian ĉirkaŭaĵon kaj ĝiajn specificecojn. Pri la tekstoj respondecas Elda Doerfler, sed kunlaboris per atenta plurfoja legado kaj reviziado: Edvige Ackermann, Antonio de Salvo, Eŭgeno de Zilah kaj nia kara Viglo. La aperintaj fotoj estas de Giuseppe Valle kaj Elda Doerfler. Rekomendindas ĝia aĉeto.

4 majo - Grupeto de esperantistoj partoprenis en la eta maratono "Bavisela Familio" en-

← daŭrigo de la 1-a paĝo

per partopreno kaj kunlaborado en diversaj agadoj. Ne ĉiam oni ŝatas tion fari, sed komprenu ke tio estas grava kaj necesa. Se tio mankos, nenio utilos por eviti malaperon de tiu ĉi grupo - se malmodeste paroli - unu el la plej renomaj en Italio kaj eĉ tra la mondo, kreita antaŭ 109 jaroj.

Mi konfesas al vi ke malapero de TEA post tiom longa vivo, estus vera katastrofo kiun mi neniam volus travivi.

Edvige Tantin Ackermann

kadre de la agado de Centro pri Volontulaj Asocioj. Ĉiuj premiitaj per memormedalo!

24^a-25^a majo - Estis organizitaj la Printempaj Karstaj Tagoj, sed promenado okazis nur dum la sabato. Lerta gvidantino estis Anita: ŝi akompanis nin de *Conconello* al *Roiano*. Ni malkovris kaŝitajn torentajn fluojn, iradis de *Conconello* al Obelisko laŭpade inter nigraj pinoj, haltis ĉe Obelisko por ĝui la mirindan panoramon. Posttagmeze, okazis promenado al *Rojan*, kun survoja halto por vizito de malnova lavejo borde de torento. Ni ĝuis historiajn klarigojn pri la vivo de antaŭ dekoj da jaroj en tiu periferia triesta kvartalo, kiam lavistinoj provizis enspezon al siaj malriĉaj familioj. Ankaŭ por ni triestanoj temis pri tre interesa promenado tra tute nekonataj lokoj laŭ la padoj de l' memoro kaj pasinteco.

Novembre - En septembro 2013, estis duafoje lanĉita la konkurso pri pentrado, iniciatita de Alessandro Soranzo, kiu metis je dispono la monon por la premioj. Partopreno en la konkurso estis senpaga, nura klaŭzo estis, ke sur ĉiu verko estu skribitaj minimume du vortoj, verdakolare en esperanto, en iu ajn alia koloro en la itala aŭ alia lingvo. Malgraŭ multa propagandado, ĉefe al la lernejoj triestaj kaj regionaj, ĝis preskaŭ la fino de septembro nenio estis alveninta. Bonŝance, tute lastmomente, antaŭ la limdato, portis siajn verkojn 19 pentristoj. La pentraĵoj estis entute 20. Je la unua etaĝo de la asocia domo estis muntita la ekspozicio, kiu inaŭguriĝis la 26^{an} de novembro, dum la premiado okazis la 5^{an} de decembro. La ĵurio konsistis el Renata Damiani, Ottavio Gruber kaj Antonio Sofianopulo. La premioj estis tiel aljuĝitaj: 1^a premio (450 €) al Giorgio Predonzan el Triesto; 2^a premio (250 €) al Željko Hudek el Aŭstrio; 3^a premio (150 €) al Rosanna Palombit el Muggia. Estis donita krome speciala premio de 100 € por la teksto plej signifoplena al la tria-klasanoj de la Elementa Lernejo "Simon Jenko", el Kranj, Slovenio.

Kaj nun pri la rutinaj **Enklubaj programoj**: dum la mardaj posttagmezoj, okazis la kursoj kaj dum la vendredaj vesperoj oni kune legis la libron „La Kapreolido Pirgo“, trafikumadis PIV-on serĉe de nekonataj vortoj, raportis pri la Grundtvig-seminarioj en Tuluzo, Pitlochry, Visaginas. Estis spektitaj la esperanta-itallingva filmo „La insulo de la rozoj“, kaj tiu pri Mazara del Vallo; viditaj fotoj pri Israelo, Kartvelio kaj pri la pasintjaraj Karstaj Tagoj. Oni esploris la interretajn paĝarojn, ligitajn al Esperanto, kiel ekzemple „Dante Poligloto“, projekto de Giuliano Turone, kaj ankaŭ oni festis somerkomence, Kristnaske kaj Jarfine.

Esperantistaj gastoj en Triesto: dum la jaro vizitis nin Elda kaj Alessandro Corrado el

Brescia; Fany Rižnar el Izola; Françoise Stride kun amikino Deborah el Ĝenevo; Hans Adriansee el Nederlando; Zdenka Rojc el Maribor.

Septembre – Venis al Triesto S-roj Morankič kaj Di Costanzo por proponi kunlaboradon por organizo de la 18^a Alp-Adria Konferenco okazonta de la 9^a ĝis la 11^a de oktobro 2015 en Opatija, Kroatio. Oni jam interkonsentis pri la temo: "Adria maro, maro de Mezeŭropo".

Pri kongresoj/konferencoj/renkontiĝoj.

Aprile, partopreno en la 7^a Mezorianta Kunveno - Tbiliso, Kartvelio; julie, en la 10^a Eŭropa Esperanto-Kongreso - Rijeka, Kroatio; decembre, post la Grundtvig-Projekto, en la Zamenhofaj Tagoj - Bjalistoko, Pollando.

25^a majo kaj novembre - Kaŝtelir: en majo, vizito de s-ino Kata Trampuh, okaze de la morto-datreveno de nia kara Marĉelo kune kun la geamikoj de Rijeka kaj, novembre, por plukado de persimonoj.

8^a-11^a oktobro - Estis organizita de Kroata Esperantista Unuiĝo (Marija Beloŝević), kunlabore kun Kroataj studoj de la Zagreba Universitato kaj Kroata Burglanda Centro Vieno, la Internacia Konferenco: "Dialekta Literaturo – Modelo por la nacia literaturo". En ĝi partoprenis Edvige Ackermann kaj Elda Doerfler, kiuj respektive kontribuis per prelegoj pri: "La Itala granda poeto Dante Alighieri kaj lia Dia Komedio", "Shota Rustaveli, fama kartvela mezepoka poeto" kaj "Dialekta Poezio, rekte al la koro".

Pri ekstera informado:

Kiel kutime **anoncoj/informoj** pri kursoj, programoj, aranĝoj en Triesto kaj aliloke estis senditaj dum la jaro al lokaj radioj kaj ĵurnaloj.

Alirprogramoj de RADIO UNO: daŭras la ĉeesto de TEA en la aliprogramoj de RAI. Dum la jaro okazis entute 8 elsendoj pri diversaj Esperanto-temoj.

Ĝeneralaj informoj

TEA-Bulteno: kiel kutime ĝi aperas ĉiun duan monaton. Ĝi estas dissendata al ĉiuj membroj de TEA, ĉu paperversie ĉu rete, kaj ankaŭ al pluraj esperantistoj/grupoj tra la mondo.

Estrarkunsidoj: dum la jaro oni kunsidis 2 fojojn. Enskribiĝis kiel membroj de TEA Alessandro Perna el Torino, Barbara Marzocchini el Monfalcone kaj Fany Rižnar el Izola.

Korespondado: en papera versio estis ricevita 13 leteroj kaj senditaj 20, kiuj troviĝas en siaj apartaj ujoj pri "Korespondado 2014". Rete oni ricevis 66 kaj sendis samnombrajn mesaĝojn. Pro la Projekto Grundtvig estis interŝanĝitaj pli ol 379 mesaĝoj. Ĉiuj retmesaĝoj troviĝas en disketo, tiel ke en ĉiu ajn momento eblas ilin konsulti.

Plie, mi rememoras al vi, ke por ĉiu aranĝo, spektaklo aŭ ajna okazaĵo estis preparitaj kaj presitaj invitiloj, broŝuroj, propagandiloj kaj afiŝoj grandaj aŭ/kaj malgrandaj.

Diversaĵoj:

CSV FVG: Dum la jaro oni partoprenis en kelkaj kunvenoj, zorgitaj de la Volontula Serva Centro de Friulo Julia Venetio, kun la celo ricevi informojn pri novaĵoj kaj uzeblaj servoj.

Fine estis decidite, post invito de la estraro de OSIEK, organizanto de la IEK - Internaciaj Esperanto-Konferencoj, ke en julio 2016 Triesta Esperanto-Asocio pretos prizorgi la konferencon en Triesto.

Per ĉi lasta grava informo finiĝas la agadraporto 2014.

Elda Doerfler

Atentigo!

Estas la ĝusta tempo por renovigi vian membrecon al TEA. Memoru, ke tre gravas via helpo por la plua ekzisto de Triesta Esperanto-Asocio, kies ĉefa celo estas la diskonigo kaj disinformado de nia komuna lingvo Esperanto. Eblas pagi rekte en la sidejo kaj ni tre ĝojos pro via vizito! Alia ebleco estas pagi pere de banko: bonvolu peti informojn! La kasisto peras ankaŭ abonojn al ĵurnaloj, revuoj, gazetoj, membrokotizojn de UEA, FEI kaj aliaj. Dankon pro Via subteno!

TEA-estraro

Grava Informo al la Asocioj

Eblas pagi la renovigon de via membrokotizo al **UNICREDITO**, titolita al

ASSOCIAZIONE ESPERANTISTA
TRIESTINA

via del Coroneo 15 - 34133 TRIESTE

IBAN:

IT 53 U 02008 02242 000102990439



Koran dankon!

LA PATRINA LINGVO, JE LA RADIKOJ DE IDENTECO
Ankaŭ en 2014 nia Regiona Instanco favoris nin per monsubteno cele al aperigo de libro pri poeziaĵoj en la triesta dialekto kaj tradukitaj al Esperanto. Ni estas laborantaj pri tio gaje kaj entuziasme: oni antaŭvidas verkojn el 6 aŭtoroj, tri virinoj kaj tri viroj. La libro estos aĉetebla kaj tre utila por donacoj en diversaj okazaĵoj: ne maltrafu ĝin, anoncu vian mendon jam nun, vi pagos post kiam la libro estos finpresita. Kaj la kosto... Ne timu, la cifero ne estos granda kaj la libro valora, inda je tralego kaj retralego.

PLIOFTAJ PARONIMOJ

"Finfine la fino alvenis - skribis en aŭgusto pasintjara nia amiko VIGLO. "Mi dankas pro la atento kaj ... ĝisrevidas!!!"

Vana senutila, neefektiva
Vanta malgrava, sendaŭra, bagatela, malmodesta, sinmontrema
Vari(aj)o amplekso de prezentitaj ŝanĝoj
Varianco (Mt) funkcio de variablo
Variablo (Mt) iu ajn valoro de granda
Variacio aldona ornamo al muzika temo
Varianto io diferenca per formo sed ne per enhavo aŭ esenco (Ar) (Be) (Mt)
Varieteo (Sp) spektaklo el diversaj ne ligitaj programeroj
Variolo (Md) kontaĝa k epidemia infekta malsano
Vato (Te) kotono kombita k premita
Vatto** (Te) mezurunuo de povo
Velo (Mr) granda tolo fiksita al mastoj k etendita por kapti venton
Vualo ① (Do) delikata teksaĵo por kovri ion; ② (Bo) membrano en ombrelfungoj k gasteromicetoj; ③ (f) ĉio kaŝanta veron aŭ realon
Ventolilo (Te) aparato por refreŝigi aeron
Ventumilo (Te) ekraneto por movi aeron
Vermo ① (Zo) grupnomo de longformaj, molaj, senkruraj senvertebruloj
 ② (f) malŝatinda, senvalora homo
Vermiĉeloj (Ga) maldik(eg)aj, fadenformaj pastaĵoj
Verto (Md) supro de homkapo
Vertago (Zo) raso de hundoj kun mallongaj kruroj; = melhundo
Vertico (Mt) sekcopunkto, de du duonrektoj en plurlateroj, anguloj, pluredroj
Verticilo (Bo) aro da plantorganoj radiante kreskantaj
Verticilio (Bo) G. (*Verticillium*) de mikroskopaj, neperfektaj fungoj
Vertigo (Md) malsano de bestoj
Vertiĝo (Md) sensaĵo de perdo je ekvilibro; kapturono
Vertrago (Zo) = leporhundo, levrero
Vortico ① (Te) fluido, kies partikloj havas rotacian moviĝon;
 ② (Md) dispozicio samcentra k radianta de iuj organoj
Verugao (Md) grava malsano, endemia en Peruo
Veruko (Md) haŭta papilomo; (Bo) verukoforma parto de planto aŭ fungo
Vespero lasta tagoparto
Vesperto (Zo) = kiroptero
Vespro (Fi) vespera Diservo
Vesto (Do) ĉio, kion oni portas sur si, por kovri la korpon; (Te) ekstera kovro

Veŝto (Do) senmanika vira brustvesto
Vibro (Fi) ĉiu el la alternaj movoj de interne agitiĝanta korpo
Vibracio = **Vibro**
Vibrilo (Te) aparato produktanta akustikajn aŭ elektrajn vibrojn
Vibrio (Md) G. (*Vibrio*) de moviĝemaj bakterioj, el kiuj pluraj parazitaj, i.a. la ĥolera (*Vibrio cholerae*)
Vibrisoj ① (Md) nazharoj de homo
 ② (Zo) longaj, haroj, sensivaj, surmuzele de diversaj mamuloj
Vilo (Zo) densa aro de mallongaj kru-daj haroj kovrantaj supraĵon (felo, tufo); (Do) aro de fadenfinoj aŭ bukloj sur teksaĵo; (Md) eta fadenforma elstaraĵo sur iuj mukozoj
Villo** (Ur) (evi) kampara bieno en Romio
Visko (Bo) G. (*Viscum* el viskacoj) de duonparazitaj arbustetoj, orname uzataj
Visto malnova kartludo
Vistulo (Ge) pola rivero
Vitralo (Ar) kunaĵo el diverskoloraj vitropecoj, kunigitaj per plumbostrioj, por formi desegnojn
Vitreo (Md) viskoza travida substanco, pleniganta la okulon
Vitrino (Fi) elmontra vitroŝranko
Vizo (Te) stampo sur pasporto
Vizaĝo (Md) antaŭa parto de homa kapo
Vizio (Md) vidosenca halucino
Viziero (Do) movebla vizagoŝirmilo de kasko; antaŭrandaĵo de kapvesto
Volto (Te) mezurunuo de elektra tensio
Volteo (Sp) rondira turno trudata al ĉevalo dum rajdado
Volumo (In) aro da kajeroj kune binditaj aŭ broŝuritaj
Volumeno (Mt) spacoparto okupata de korpo
Zeno (Fi) metodo de meditado por akiri menso-stabilecon
Zenano ① (Do) parto de hinda domo, kie estis apartigitaj la virinoj de altaj kasto; ② (Do) delikata ŝtofo
Zendo (ark) avesta lingvo
Zibelo (Zo) Sp. de martesoj (*Martes zibellina*) kun valora felo
Zibeto (Zo) Sp. de viveredoj (*Viverra zibetha*) kun stria felo
Zizelo (Zo) G. (*Citellus*) de stepa ronĝulo
Cibeto (Zo) ŝaŭma sekreciaĵo de glando de zibeto
Civeto (Zo) grupnomo de rabobestoj (*Viverra civetta*) el viveredoj
Zirkono (Ge) mineralo el zirkonia silikato
Zirkonio (Ke) elemento-Zr-; metalo korodimuna, industrie uzata

** Maloftaj ekzemploj de duobla konsonanto.



Caporai aŭ viandorulaĵoj el sabeliko

Tiu ĉi estis plado kiun ofte mia patrino altabligis, precipe dum la vintra periodo, kaj de tempo al tempo ankaŭ miaj familianoj manĝis ĝin frandeme. Antaŭ dekoj da jaroj, "caporai" [kaporài] estis preskaŭ 'devige' servitaj dum la novjara nokto-manĝo. Plej probable, en nia provinco, ĉi tiun pladon elpensis la karstaj dommastrinoj aŭ la ĉirkaŭurbaj kamparaninoj.

Tamen, pli-malpli tiaj preparaĵoj troviĝas en sufiĉe vasta areo, en Turkio - "dolmàs" el vitaj folioj; en Serbio - "sarma" el acidaj brasikfolioj; en Aŭstrio.

Jen kiel oni pretigas ĉi frandaĵon en Triesto.

Ingredienoj por 4 personoj:

- 12 sabelikaj folioj, boligitaj 3 minutojn en salita akvo
- 700 g da muelita viando, bova kaj porka
- 150 g da rizo, jam kuirita en salita akvo, 15-minute, poste lavita sub malvarma akvo kaj elkribrita
- 3 kuleroj da oleo
- unu taso da dispremitaj tomatoj
- iom da vinagro
- unu pinĉeto da aromspicoj
- salto kaj pipro

Preparado:

En ujon metu la muelitan viandon kaj la rizon, aldonu salon, pipron kaj aromspicojn, kaj zorge miksu. La kunmetaĵon fritetu en pato kun oleo, ĝis ioma koloriĝo de la viando. Almetu glutaĵon da vinagro, ĝin vaporigu, kaj lasu la tuton malvarmiĝi.

Nun dividu la farĉon en egalajn partojn sur la dek du foliojn de sabeliko: ĉiun folion vi rulu, fermante zorge la enhavon.

En kaserolon for-norezistan, metu la oleon en kiu vi fritetis la viandon kaj aldonu la premitan tomaton, iomete ĝin salu kaj kuiretu ĝis densiĝo. Poste enigu unu apud la alia la 12 viandorulaĵojn. Per kulero verŝu sur ilin la tomatan saŭcon. Enfornigu la kaserolon kaj kuiru je 180-grada temperaturo dum ĉirkaŭ 10-15 minutoj.

Fine, ... bonan apetiton!



BULTENO DE TRIESTA ESPERANTO-ASOCIO
Redaktanto: Elda DOERFLER - testudo.ts@gmail.com
Sidejo/Poŝta adreso: Via del Coroneo 15 - IT-34133 Trieste
Kunventagoj: marde 17-20; vendrede 19-21
Tel: (+39) 345 2490291 - 040 350093; 339 2226936
Banka Konto: Unicredito - IBAN IT 53 U 02008 02242 000102990439
Reto: esperantotrieste@yahoo.it; nored@tiscali.it
Asociaj ttt-ejoj: www.tea1906.altervista.org;
 www.karstajtagoj.altervista.org

Marta Programo

3a, mardo	17h30 - Konversacia rondo
6a, vendredo	20h00 - 8-a de marto TAGO DE VIRINOJ - Memorante pri Clelia Conterno Guglielminetti
10a, mardo	17h30 - Konversacia rondo
13a, vendredo	20h00 - Tradukado de triestaj poeziaĵoj al Esperanto
16a, lundo	14h40 - Esperanto en alirprogramoj Rai Uno: Niaj novaj agad-projektoj
17a, mardo	17h30 - Konversacia rondo
20a, vendredo	20h00 - Fotoj pri Grundtvig-Seminario en Visaginas, Litovio
24a, mardo	17h30 - Konversacia rondo
27a, vendredo	20h00 - Trafoliumante PIV-on!
31a, mardo	SIDEJO FERMITA!

Aprila Programo

3a, vendredo	20h00 - El la E-gazetaro
7a, mardo	17h30 - Konversacia rondo
10a, vendredo	20h00 - Tradukado de triestaj poeziaĵoj al Esperanto
14a, mardo	17h30 - Konversacia rondo
17a, vendredo	20h00 - Esperanta Televido
21a, mardo	17h30 - Konversacia rondo
24a, vendredo	20h00 - PROJEKTO GRUNDTVIG 2013-2015: rezultoj, impresoj, bildoj, memoraĵoj
28a, mardo	17h30 - Konversacia rondo



La franca **Esperanto-Kulturdomo** en kastelo Greziljono invitas vin ĉesti ĝiajn aktivaĵojn.

Programo 2015

Aprilo 3^a-8^a: Renkontiĝo de Interkant' kaj kunkantado kun La Kompanoj - gresillon.org/spip.php?article140
 Aprilo 17^a-25^a: PRINTEMPaS, intensivaj kursoj kun Zs. Korody, Ch. Chazarein, M. Quenut

gresillon.org/printempas

Aprilo 25^a-26^a: PRINTEMPaS, internaciaj KER-ekzamenoj (B1, B2, C1)

gresillon.org/printempas

Jul-20^a-25^a: Reĝaj ekskursoj, UK-antaŭkongreso

gresillon.org/s2

Aŭgusto 1^a-8^a: Lingva semajno, Lingvofestiva leto, tuj post UK - gresillon.org/s3

Aŭgusto 8^a-16^a: Festa Semajno por infanoj kaj familioj - gresillon.org/s4

Jara agendo/kalendaro en gresillon.org/agendo

Uno per tutti ... cinque per mille!

AIUTACI AD AIUTARE L'ESPERANTO

*Il 5 per mille dell'IRPEF all'Associazione Esperantista Triestina
senza costi per voi!*

Anche quest'anno i contribuenti, grazie alle disposizioni inserite nella Legge Finanziaria 2006, possono destinare il **5 per mille dell'imposta stessa** a sostegno di determinate iniziative di rilevanza sociale.

**La nostra Associazione è fra gli enti che
possono ricevere questo contributo.**

Come fare ?

È molto semplice: basta indicare il numero di codice fiscale dell'Associazione nell'apposita casella prevista per la destinazione di questo contributo, nel momento in cui effettuerete la dichiarazione dei redditi per il 2014 (con il mod. Unico, il 730, il CUD, ecc). Il codice fiscale da indicare è il seguente:

90012340320

Invita perciò i tuoi amici, parenti, conoscenti, colleghi di lavoro, e tutte le persone che in qualche modo si dichiarano favorevoli all'esperanto, a scrivere nell'apposito spazio previsto nella dichiarazione dei redditi il

**numero di codice fiscale
dell'Associazione Esperantista Triestina**

Ringraziando per l'appoggio che ci potrai dare, porgiamo cordiali saluti.

ASSOCIAZIONE ESPERANTISTA TRIESTINA

Il Presidente

(Edvige Ackermann)

Associazione
Esperantista Triestina
90012340320

Associazione
Esperantista Triestina
90012340320

Associazione
Esperantista Triestina
90012340320

Associazione
Esperantista Triestina
90012340320

Associazione
Esperantista Triestina
90012340320

Associazione
Esperantista Triestina
90012340320

Associazione
Esperantista Triestina
90012340320

Associazione
Esperantista Triestina
90012340320

Associazione
Esperantista Triestina
90012340320

Associazione
Esperantista Triestina
90012340320